Proceso de la Sanktuloj. — La centjara datreveno de S. Francisko kaj de S. Luizo, kiujn pompe oni memorigos dum la nuna 1926, vekis intereson de la publiko pri ritoj, ceremonioj, religiaj servoj, kiujn la Eklezio pretiĝas plenumi por laŭdegi la virtojn de ĉi tiu grandaj sanktuloj. Kaj spontane ekstaras por nesciuloj la demando: kiel oni fariĝas Sanktuloj? Tra kiaj okazajoj la homa kreitaĵo, kiun oni opiniis sankta, povos atingi kulton de la altaroj? Patrino Eklezio pretiĝas veran proceson en kiu vidiĝas la jurintoj, la kulpiganto kaj la pledanto, antaŭ ol kanonizi modelan filon sian. La servanto de Dio, sanktigota, unue iĝas venerinda, poste beata kaj fine sankta.

La supera Tribunalato. — La supera Tribunalato de la kanonizadoj estas la Kongregacio de ĉi tiu Sanktaj Ritoj, ĝi do procedas por la beatigo aŭ kanonizo de ĉi tiu servantoj de Dio kaj pretiĝas proceson kaj dokumentojn por rekonigi martirigon elportitan por katolika kredo. La unua proceso kiun pritraktis ĉi-tiu kongregacio estis al 25 martiroj en Japanlando, monaĥoj dum papregado de Urbano VIII, sama papo, pro kroniko dirite, procesinta Galileo'n Galilei'n. Samtempe, bone estas memorigi ke sen permeso de la Kongregacio oni rajtas procedi al beatigo, kanonizo aŭ pri martir-deklaro, nur 50 jarojn post la morto de ĉi tiu koncernaj servantoj de Dio. La sama kongregacio laŭ Dekreto de Urbano VIII, kiam petita, donas al urboj, provincoj, regnoj kaj nacioj ian Sanktulon kiel protektanton. Ĉe la eksterordinara kunveno de la Kongregacio por kanonizoj kaj beatigoj kunvenas la kardinaloj elektitaj, la prefekto de la kongregacio kun la sekretario kaj

kelkaj ceremoniaj majstroj, diversaj prelatoj, inter kiuj la tri pliaĝaj ekleziaj juĝistoj, kiel spertaj kanonistoj kaj konsultistoj laŭ sufiĉaj pruvoj pri mirakloj, virtoj aŭ martirigo; kunvenas ankaŭ la prelado protonotario, la asesoro de ĉi tiu Sankta Ofico kaj la Promotoro de la Kredo, kies rolo estas tiu de fiska kontraŭulo, kaj kelkaj konsultistoj de la ordinara pastraro, lertaj en teologia scienco.

La oferdonoj. — La Kongregacio de la Ritoj kunvenas en la Apostolan Palacon por ekzameni etajn dubojn en la afero de ĉi tiu Sanktuloj. Poste dum eksterordinara kunveno oni pritraktas grandajn dubojn en aferoj de beatigo kaj kanonizo, de martirigo, virtoj kaj mirakloj. Tamen la voĉoj nur estas konsultaj, tial ke fina decido dependas de la Papo.

Kiam serviston de Dio oni proklamas Sanktulo, oni grandpompe procedas al lia kanonizo. Ĉi tiu ceremonio vere spektakloplena plenumiĝas en la Vatikana Baziliko. Preskaŭ ĉiujn oni plenumis en S. Petro, nur kelkajn en S. Johano Laterano.

Plenuminte la kanonizan riton, Lia Sankteco donas laŭ kutima rito benon, kaj leginte la ofertorion ricevas sidante la jenajn oferdonojn: Du vaksaj kandellegoj bele pentritaj kaj rabeskitaj el oro kaj arĝento kun bildo de ĉi tiu Sanktulo kaj papa ŝildo. Du panegoj kun orumaĵoj kaj altreliefoj. Du bareletoj ĉizitaj, ornamitaj per blazonoj el oro kaj arĝento, plenaj je vino. Tri kagoj bele ellaboritaj entenantaj: la unua du turtinojn, la dua du kolombinojn, la tria birdetojn diversspecajn. Ĉi-tiu ceremonio de la oferdonoj estas kurioza kaj praantikva.

Ĉi tiuj oferdonoj havas sian mistikan

signifon. En la kandelegoj, kies ŝtofo devenas el mirinda laborado de la abeloj, elmontriĝas la sankta humaneco de la Savinto kaj en ties meĉo animo Lia. La pano simbolas nutraĵon ĉiuspecan: do oferdonante la panojn oni komprenigas virtojn ĉiuspecajn, kiujn praktikis la Sanktulo por atingi gloron. La vino, esprimoplena simbolo de l' Graco, diras al ni ke ĝin abunde posedis la Sanktuloj kaj entenis iliaj koroj. La turtinoj simbolas fidelecon kaj memorigas fidelecon de l' Sanktuloj al Dio. La kolombinoj, kiel emblemo de paco post la superakvego, al ni diras, ke finiĝis por la Sanktuloj la senindulga mondbatalado. Fine la diversspecaj birdetoj simbolas la avidemon por la Ĉielaj aferoj de l' Sanktuloj, sinlevantaj ĉiam pli altan, forlasante la teron kvazaŭ birdoj.

Kalendaraj numeroj. — Por konkludi kaj por kontentigi eble la scivolon de la legantoj, ni memorigos la kanonizon de l' plej konataj Sanktuloj: S. Bernardeno el Sieno, franciska o, kanonizita de Nikolao V; S. Karlo Borromeo, de Paolo V; S. Katareno el Sieno, de Pio II; S. Bonaventuro, de Sisto IV; S. Francisko

el Paola, de l' granda Leono X; S. Filipo Neri, de Gregoro XV; S. Elizabeto, regino de Portugalio, de Urbano VIII; S. Francisko el Sales, de Aleksandro VII; S. Petro el Alkantara, de Klemento IX; S. Margareto el Kortona, de Benedikto XIII; S. Alfonso M. el Liguori, de Gregoro XVI. Ĉiuj ĉi kaj aliaj, antaŭ kaj poste havis sian kortuŝigan kaj luksoplenan ceremonion kun procesioj, kantoj, sonoj, koloroj, incensadoj kaj ornamadoj en Baziliko S. Petro, lulilo kaj lumo de la katolika kristanaro tutmonda. Unu el lastaj solenaj kanonizoj estis tiu de Johano el Arc, la sentima militema Virgino bruligita en Rouen kiel sorĉistino kaj nun levita al kulto de la altaroj.

Kaj se iu ankaŭ volus scii kiom nombras la Sanktuloj, mi diros ke la *Martirologium romanum*, eldonita en 1878, parolas pri 4420; tio signifas ke ĉiutage ni havas meznombro 12 memorigojn de Sanktuloj, sed la civila kalendaro notas da ili nur unu aŭ du, kiel ĉe datreveno de Petro kaj Paolo kaj tiu de Kosmo kaj Damiano.

El Domenica del Corriere

trad. M. Arabeno

FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA

(Conto Corrente Postale 5/573)

Dispaccio ricevuto mentre si stampava la rivista:

COMUNICAZIONI UFFICIALI

MANIFESTO DEL CONGRESSO. — Si prega ogni gruppo o samideano isolato di indicare quanti ne crede opportuno fare affiggere nel proprio paese.

PROPOSTE PER IL CONGRESSO. — Saranno ammesse solo quelle che riguardano azione pratiche di assistenza ai nostri connazionali, ai marittimi ed ai samideani in genere per fruire più largamente dei benefici della conoscenza dell'Esperanto e delle organizzazioni dell'U.E.A.

PROPOSTE PER L'ASSEMBLEA DEI FEDERATI. — Oltre rendiconto e nomina del nuovo direttorio saranno prese in considerazione proposte per modifica statuto, aiuti alla I. E. R., stabilità di una sede.

SONO IN CORSO di stampa i documenti per il ribasso ferroviario accordato nella misura del 30%.

RADIO AUDIZIONE: Musica e discorsi in Esperanto: il 6 Settembre, alle 18.30 (Greenwich) per 15 minuti da Londra, onda 600.

IL CONGRESSO SVIZZERO avrà luogo il 10 Ottobre a Zurigo, Zunfthaus zur Waag.

Per lo spazio preso dalla descrizione di Livorno e degli esercizi di Salvataggio, di cui sarà dato saggio in mare in occasione della gita dei Congressisti alla Meloria, non è possibile riportare le adesioni alla F.E.I. e al Congresso.

ROMA AŬTUNO

Per tiu ĉi artikolo D-ro Maurico Scheyer priskribas en Neues Wiener Tagblatt siajn impresojn pri Italio kaj italoj. Publikagante ĝin, ĉi intencas konigi al la legantoj kiel la eksterlandanoj juĝas pri ni.

JE frua mateno, griza, parte ankoraŭ dormanta stacio, kie la *Direttissimo* Milano-Romo, kelkajn minutojn haltas. Oni eliras kaj la fruntojn kaj tempiojn ĉirkaŭblovas milda, opala helo. Sed en tio ĉi pura aŭtune nuancita, kaj jam iom laca aero vibras io, kio estas akra, kio maltrankviligas kiel kiso, ĉe kiu oni dezirus pereji kaj kiu samtempe la nervojn vipinstigas al plej forta streĉado.

Kaj tiun necertecon, tiun necertan atendadon subite alterne sekvas liberiga ekscito, tremetado de l' retrovo kaj plenumigo: tiela estas la anima agordo de tiu, kiu post longaj jaroj de disigo kaj sopiro, denove intervidigas kun la matino, kaj ŝi ridas renkontante vin, kvazaŭ ŝi hieraŭ nur estus vin forlasinta, pli bela kaj pli dezirinda ol iam pli frue.

Tie ĝi etendigas vere antaŭ mi, proksima, kaj tamen plena je senlimaj malproksimoj, sentempa kaj tamen plena de forgeso: la maro. Estis ĝia aromo, ĝia reĝa spiro, kiujn mi sentis en la plejinterno, kiuj al mi preskaŭ dolore ekbruligis la sangon. Post jaro ree la maro.

Nun sur la ĉielo disigas la unuaj sunradioj, kiuj similas orajn kordojn, kaj se ilin flugektuŝas birdo, oni opinias aŭdi delikatan, en la sferojn forpasantan sonadon. Super la akvo kliniginte glitas kelkaj veloj, blankaj kaj orangkoloraj, malrapide en agrabla distreco, kiel post reveno de feliĉaj insuloj.

Estas unu el tiuj maloftaj momentoj, kiam oni ne plu sentas la obtuze dolorigajn katenojn de la propra *mi*, la ne-

kuraceblajn vundojn de l' konscio, kiam oni sin ne plu kredas disigita de ĉio viva: kiam oni for de ĉia estanteco kaj ĉia rememoro, sentas liberege kunfandiĝi la propran eston kaj la senlimecon tie ekstere, al muta skuiĝanta ĉirkaŭbrako.

La *Pronto!* de l' vagonarkondukisto. Ni forlasas la stacion: *Civitavecchia*.

Tie ĉi pasigis Stendhal, estante franca konsulo, malgajajn tempojn de nostalgio al sia amata Milano, tien ĉi « al malfermita maro » volis forkuri *Tosca* kun *Cavaradossi*...

La *Direttissimo* rapidegas tra la *Campagna*. En apenaŭ unu horo ni estos en Romo.

Roma aŭtuno: oni ĝin gustumas, lasas ĝin degeli sur la lango, nobla tromatura frukto, travidebla vinbero, en kiu ŝajnas enŝlositaj la lasta dolĉeco kaj la lasta sango de la suno. Romaj aŭtunmatenoj sur la *Pincio* kaj en la sendeziraj gardenoj de la vilao *Borghese*: la lumo estas fiancine juna kaj kristala, ke oni povus kredi al revekigo de l' printempo, se ne estus samtempe en la aero nevidebla adiaŭado, la amara kaj terura spiro de l' « pasado », la mortelaca, malsana rideto de animo, kies sorto jam plenumigis, kaj kiu nenion povas esperi plu, nenion atendi ol la grandan mallumon. Horo pasigita sur la malnova *Via Appia*, *Appia Antica*: kiam velkas la tago, kiam silento kaj viola krepusko ekaptas la *Campagna*'n, kiam dume ŝajnas gigante kreski versperĉielen la si-

lueto de la *Tomba di Cecilia Metella*. Giganta kaj tamen nur fantoma monumento de forpasado kaj de nenio post ĉiuj krioj kaj ĉiuj orgioj. Terura malkuraĝeco ŝajnas levigi de sur la tero. Sur la horizonto estingigas lasta lumstrio kaj oni volus ĝin alpreni al si en neeldirebla humileco kaj sindoneco, kiel oni ĉirkaŭbrakas lastan esperon, amatinon, antaŭ ol ŝi forlasas nin, kaj oni scias, ĉio ĉi estis vana, ŝi neniam, ne plu revenos.

La strio estingigis kaj oni restas sola kun si kaj sia soleco.

Roma aŭtuno: multkolora, infana popolo en *Rocca di Papa* kaj *Albano*, topazkolora arda vino en *Castel Gandolfo*, en la malgranda *Trattoria*, malsupre de la papa vilao, kie loĝas nun la plej eleganta el la kardinaloj, Merry del Val. Tute sube en la ruĝa malfruposttagmeza suno brulas Romo, kvazaŭ ŝtiparo de volupto, maldekstre brilas abunde la Tirrena maro kaj ĉiu guto de la nobla, topazkolora vino, donacas elrigardon al proksima fabelinsulo: en vivon sen malbeletaj kaj suferoj.

Horoj en *Frascati* en la ĝardeno de l' vilao *Grazioli*, kie je l' fino de longa ombro kaj sekretoplena vojo, en malgranda maldensejo subite eksonas mirige akordo de grizo kaj verdo: malnova ventodifektita fontano lokita en musko, la senmova akvoebenajo kovrita de delikata alga vualo, kaj ĉe la piedoj de la fontano dise kelkaj timemaj ciklamoj, kiuj ŝajnas sin serĉi reciproke per siaj ĉastaj okuloj. Horoj en la vilao *Aldo-brandini*, kie en sekreta, intima bosko, malhelaj tromaturaj rozoj, jam mortante, kovras la belegan nudan ŝultron de marmora *Diana* per siaj folioj, kiel per mutaj kisoj. Tie mi ankau legis la devizon: *Odi et ama!* (Malamu kaj amu!) Tiuj, kiuj al si konstruigis tiun ĉi noblan

miraklon, tiuj homoj komprenis ambaŭ aferojn: malami kaj ami. Ĝuemaj posteuloj de la Renesanco, de la luksa poemo pri volupto, pri sango kaj morto.

Roma aŭtuno: sude blua nokto sur la *Forum Romanum*, je ŝtono rigidiginta fantomo de l' Antikvo en mondrevo de la sankta roma Eklezio. Ruinoj de l' kontestado. La konsuloj, la legionoj, la senato, la imperato, ĉe ĉiu triumfo de l' venko kaj de l' ĝuo ili nur forgesis pri unu: pri la fino. Kio restis? Kripligo kaj ruberoj, ruberoj kaj kripligo. Sub la arkoj de l' Koloseo serĉas senloĝejuloj rifugejon por la nokto.

Sed la aero super ĉiu ĉi tragiko estas delikata kaj mola, kiel virinmano, kiel virinmano, kiun oni dankeme premus al la lipoj.

Defunde ŝanĝigis — je sia avantaĝo — la moderna Romo: ĉie ordo, pureco, disciplino. Ne ekzistas plu marĉandado kun veturigistoj, nenia preztrompado. La trinkmono estas preskaŭ ĉie forigita: por servado oni kalkulas la procentojn. La fervojoj estas zorgeme puraj, kaj la vagonaroj veturas kun severa akurateco.

Ĉie oni renkontas grandajn plakatojn: *Chi non lavora, non ha diritto alla vita* (kiu ne laboras, ne havas rajton je la vivo). Kaj tiu ĉi admono ne estas nur sur la papero: nune oni laboras en Italio kun norda persisteco.

La Romaninoj ne ŝanĝigis en ilia dekorativa beleco, belegaj virinoj por la okulo, kiam ili en duka sinteno paŝas sur la *Piazza Colonna*, altkreskaj, kvankam sur la vizago masko de certeco kaj gemeca malvarmo, tamen en la okuloj kaj en la flekseblaj melodioj de iliaj korpoj ekfajreras deziro kaj pasio, kaj ĉarmo kaj allogo dissendas siajn ensorĉ-

igajn ondojn kaj la stampo de iliaj molaj, erotikaj voĉoj ŝajnas saturita de provoko kaj tento.

Nur rapide ili maljunigas en la Eterna Urbo, pli rapide ol la Milananoj, aŭ la famaj Bologninoj: la beleco de la Romaninoj plejgrandparte antaŭtempe likvidacias. Por kiel eble plej longe kaŝi la elvendadon, ili sin kelkfoje lakas tiel, ke oni preskaŭ estus tentata ĉirkaŭpendi al iu el ili tabuleton: Atentu! Frespen-trita!

Unika urbo!

Por adiaŭi ĝin, mi iris al la *Fontana di Trevi*: antaŭ du jarmiloj latina knabino malkovris tiun ĉi fonton kaj prezentis ĝian virgulinan akvon — *aqua virgo* — al la soifantaj romaj legionanoj.

Oni trinku el la *Fontana di Trevi*, kaj poste jetu moneron mezen sur la akvosurfaco: tiam ekestos ebleco revidi Romon. Tion pretendas malnova superstiĉo.

En krepuskiganta vesperò mi hejmeniris, ankoraŭ unufoje tra la stratoj kaj placoj kie maltrankvileco kaj detruo serĉis ripozon.

Romo, la Eterna Urbo, estis detruita kaj restarigis el la ruberegoj, sed kion homoj en la homo detruis, plue kuŝas morte sub la rubo.

De sur la *Trinità dei Monti* ŝvebas sonorado de l' sonoriloj. Malsupre sur *Piazza di Spagna* estingigas bonodora kolorsimfonio en malhelo. La aero estas plena je sorĉa mildeco.

Adiaŭado de Romo. Nur tie ĉi oni povas kompreni la melankolion de ekziligita Ovidjo:

*...illius tristissima noctis imago
quae mihi supremum tempus in Urbe fuit...*

...de tiu nokto plejmalĝoja bildo
en kiu mi adiaŭprenis de Romo...

D-ro Maurico Scheyer

Trad. el la germana Karlo Kozina

AL LA JAPANA JUNULARO

La Japana Imperio, kiu havas gloran historion de dudeksep jarcentoj, sub nur unu dinastio, ĉiam venkata kaj neniam venkata, atingis altan rangon de civileco, ankau absorbante kaj alproprigante al si la Okcidentan civilecon.

« Asimili la spertecon de la aliaj, por riĉigi sin mem ». Jen estas fonto de vivo kaj ilo de potenco. Sed simple kopii la aliajn por forlasi sin mem ĉu ne estas tiu ĉi, la kaŭzo de la krizo kiu povas minaci la popolon, devenantan de la fierega gento de la *Samurai*?

Ne perdu, ho junaj Japanoj, la miljaran spiriton de via raso, submetigante je la moderna materialisma demagogio, kiu puŝis multajn naciojn al tempoj de maltrankvileco kaj de mizero.

« Italujo, kiu havas geografiajn kaj moralajn kunrilatojn kun Japanujo, firme rekonstruis sin per mirinda agado de siaj

Nigraĉemizuloj, ĉiam pretaj kian ajn oferon kaj ĉiun ajn alvokon de la Patrujo.

La Faŝismo, kiu baziĝas sur la sento de la devo kaj sur la konscia akcepto de la disciplino, sur la hierarkio kaj sur la patriotismo, ĉu ĝi ne realvokas, eble, al viaj junaj koroj la rememoron de la centjara *buŝido*, kiu ardigis la animojn de viaj patroj kaj konservis ĉiam forta kaj kunigita la Imperion de la Leviganta Suno?

La vera forto de la Nacio estas en vi mem, ho junuloj de ĉia rango kaj de ĉia metio.

En vi estas la sorto de la glora morgaŭo. Starigu, ho bravaj kaj grandanimaj junuloj, kaj faŝiste kriiu, por via Patrujo: *Al Ni!*

Romo, Marton 1926, III Jaron.

MUSSOLINI

Itala Faŝistestro kaj Ministrestro

P R I

Ĉevalforto, Ĉevalpovo, Ĉevalpotenco

La vorto estas teknike tre grava kaj uzad-ata eĉ komunlingve.

Pri Esperanto oni devas malaprobi kaj malpermesi enkondukon de eraraj formoj, kvankam kelkfoje ili estas uzataj — erare — ĉe iu nacia lingvo, ĉar Esperanto ne povas esti kompatata, kiel ĉi tiu lasta, pro la neeviteblaj influoj de la ĝenerala uzado sur la racieco de la lingvo.

Teknike Esperanto estas nun uzata nur de malmultaj esperantistoj. Ili povas facile forigi ĉian eraron el siaj artikoloj, leteroj, verkoj kaj vortaroj. La venontoj ĉerpos la ĝustan esprimon kaj fidele uzos ĝin: do malpli facile ol ĉe nacia lingvo, kiun ĉiu emas uzi sen kontrolo kaj sen atentemo, enŝoviĝos fuŝaĵoj.

Mi do varme petas, ke ĉiu teknikisto atentigu kaj laŭbezzone korektu la malĝustajn vortojn, des pli zorge, ju pli ili estas gravaj.

Eĉ en « Libera Tribuno » de Heroldo mi vidis uzata la vorton *ĉevalforto* (simbolo internacia HP): ekz. de S-ro F. Knop el Mainz (pravega ĉe la cetero), en n-ro 60, 1925.

Nu, la vorto *ĉevalforto* estas absolute granda eraro, eĉ ridinda absurdaĵo.

« Ĉevalo » aŭ « ĉevalo-vaporo » nek estas nek iam estis unu de *forto*: ĝi estas unu de *potenco*. Ĉu estas necese memori ke *potenco* rilatas al *forto* tiel:

$$P = F L T^{-1}$$

do ke ĝi estas al ĉi lasta neegalebla, se oni ne volas arbitre nenigi la dimensian faktoron « rapideco » ($L T^{-1}$)?

Eĉ en Italujo oni ofte parolas inter teknikistoj pri « forto en ĉevaloj » de iu motoro aŭ maŝino: sed tio-ĉi pravas tute simple ke la parolanta teknikisto ne estas tro klera, aŭ ke li ĉerpas la esprimojn hazarde el senorda cerbo. Kelkfoje el tiuj eraresprimoj aŭ plibone esprimfuŝadoj naskiĝis senutilaj diskutoj, enuigantaj pro ilia vaneco ĉiun seriozan teknikiston.

Laŭ praktika mezursistemo oni uzas por *forto* la unuan « kilogramo ». Estas do ĝusta, kvankam ne uzata, la esprimo « kilogramo-forto ».

De *forto* venas la « fizika fakto » *laboro*, kiu estas produkto de du faktoroj, *forto* kaj *longeco* (de moviĝo). La simbolo de tiu « fak-

to » estas *E* (*energia* = produkto de — aŭ kapablo pri laboro); kaj ĝia dimensio

$$E = F L$$

Unuo de laboro: « kilogrammetro », *kgm*: kaj neniu bonorda cerbo dirus « kilogrammetran forton » anstataŭ « kilogrammetran laboron ».

De *laboro* venas la « fizika fakto » *potenco*, kiu estas raporto de du dividajoj, *laboro* (aŭ *energia*) kaj *tempo*. La simbolo de tiu « fakto » estas *P*, kaj la dimensio, la superskribita.

Unuo de *potenco*: 75 kilogrammetroj po sekundo, *ĉevalo(vaporo)*: kaj neniu bonorda cerbo diros « ĉeval-forton » aŭ « ĉeval-laboron » anstataŭ « ĉeval-potencon ».

Mi difinis la « fakton » $F L T^{-1}$, *potenco*. Oni povus malplibone, kvankam ne tute erare kiel pri *forto*, uzi anstataŭ ĝi, la vorton *povo*. Sed mi rimarkigas ke se ĉi-tiu lasta esprimo sonas plibone ĉe anglaj oreloj pro ilia nacilingva alkutimiĝo, ĝi estas nepropraca je la koncepto esprimenda. Efektive la vorto *potenco* aperas en la Oficiala Klasika Libro jene difinita:

Potenco: puissance; might, power; Macht

kaj precize signifas: « la fakto havi je sia dispono tioman kvanton da energio, da kapablo; dum *pov'*, verba radiko, signifas: « eblas, neniu aŭ nenio kontraŭas ke oni faru tion ». — Ekz.: *levadaro*¹⁾ havas la *povon* levi tiun ŝarĝaĵon, sed ĝia *potenco* ne estas tioma, ke ĝi povu suprentiri ĝin je sufiĉa rapideco. Tiu-ĉi ekzemplo sufiĉas, laŭ mi, por montri la malpli precizan kaj pli vastan signifon de la radiko *pov'*, ne plene taŭgan por preciza esprimo matematika, nur unusence interpretenda.

Resuma konsilo al verkistoj kaj vortaristoj: ni oficialigu kaj uzu *ĉevalpotenco*'n: ni eventualo toleru *ĉevalpovo*'n: sed ni energie kontraŭbatalu kaj forigu la malĝustan kaj sensencan esprimon *ĉevalforto*'n.

La Spesia (Italujo).

R. Orengo

1) *Levadaro*: leva maŝino; dum *levilo*, stango aŭ simpla ilo por levi. *Levadaro* = *lev-ad-or-o*, dank' al teknika suikso *-or-*, montranta la aganton, tiun aŭ tion, kiu aŭ kio faras, produktas, kreas. *Altern-ad-or-o*, *transform-ad-or-o*, *akumul-ad-or-o*, formoj tre oportunaj kaj taŭgaj por elektro-aparatoj, anstataŭantaj la teknike kaj lingve nebonajn « *alternilo*, *transformilo* » ktp.

FATEVI ABBONATI SOSTENITORI

FLUGADOJ TRA ESPERANTUJO

La verda flago je mil metroj super la Centra Oficejo.

Domaĝe ke la aero estas tiom nebula, malhela!

Ĉi-tiun fojon mi fermis miajn blankajn flugilojn, kaj mi min konfidis al flavaj aloj de birdegaĉo bruanta.

Trans la vitro la alo de la aviadilo, flugilo senmova, eĉ vibranta en la aero, kovras parton de la bildo enkadrigita; sed antaŭe, malantaŭe, vidiĝas la tero malproksima, la stranga pejzaĝo nekonsista de kiu neniam sin superleviis flugante.

La *Rhône*, granda serpento malhela, nur laŭ mala direkto de nia flugado brila sub la sunradioj, malproksimen.... Sennombraj dometoj kamparaj tie kaj tie, ĉiam pli malgrandaj.... Dekstre, tra la griza aero, grandaj verdnigraj makuloj maldifinitaj, ĉiam pli oftaj: montetoj.... eble montoj tie, post la nuboj.

De tempo al tempo mi min turnas reen. Alkreĉita per elastaj rubandoj la barografo min sciigas pri la preciza alteco atingita: 1200.... 1300.... De tempo al tempo la horizontalaĵ direktiloj nesentible fleksiĝas, la aviadilo supreniĝas rapide, poste revenas al ebena glitado, kiel suprenrampante kolosan ŝtuparon nevidatan. Se mi ne estus mevo, momente mi ektimus pri marmalsano!...

Jen ĝuste: la *Farman*-Kompanio donas oportunan averton. Apud la seĝego estas papero presita, kajero «... kontraŭ la aermalsano...». Nu, por hodiaŭ, vane: ni tre bone fartas. Mia knuto de la interna kajuto, amerikano malbabilema, rigardas indifere de tempo al tempo, eĉ kelkmomente li ŝajnas enuanta. Malantaŭ ni, en la supera sidilo, apud la piloto, ĉarma franca fraŭlino entuziasme guas sian flugadon. Ŝi bonfartas kaj ridetas, neniom timas. La plena plezuro traveturi libere kaj mastri la altan aeron nin kaptas. Kiu pensus pri danĝero, tiu ne estus inda rigardi la mondon de la altecoj neatingeblaj.

Inter niaj piedoj kaj nia vivejo estas abismo: kaj ĉiu abismo estas risko, sed ankaŭ grandeco.

Ni jen interne en blanka vatujo. Nubo nin izolus en la soleco de la spaco atmosfera. Nun la bruegado unutona, senĉesa de la motoro fariĝas de tempo al tempo proksima, ĉeestanta je mia konscio. Sed ĝi min alkondukas

al revado kiel la batado sur la reloj de rapida trajno dumnokta, kiel la marbruado de miaj bordoj sub la stelaro senmova.

Subite ni eliras al travedebla aero. Starigas antaŭ ni alta kruta montoĉeno kovrita de arbaroj malhelkoloraj. Ŝajnas ke ni baldaŭ falos kontraŭ ĝin: tamen la blua inkolinio de la barografo ne ĉesas leviĝi, tremante: 1700.... 1800.... 1850.... Jen sub ni kaj flanke la vertovico de la *Svisa Jura*. Jen tie, malproksime, Genevo. La aero plibeliĝas. La distanco estas granda... sed ni alproksimiĝas rapide, ni estas apud la urbo, ni estas super ĝi: helielinie ni rondflugas kaj nia motoro eksilentas, eksplodas interrompe.... La tero alproksimiĝas, la tuta lando ondumas.... Jen sur la lago mirinda veloj, boatoj, ŝipetoj, jen la pontoj, la verda arboza insuleto *Rousseau*, la *Rhône* rapide elfluanta, la urbo luksa kaj ĉarma, riĉaj vilaoj ĉirkaŭe.... Sed....

Sed ĉio enprofundiĝas trans arboj, trans konstruaĵetoj apudaj.... Ni algrundiĝas. La unua kiso al patrino Tero estas ŝmako iom malĝentila. Ni saltegas tra la herbejo. Sed la piloto, vera majstro je kiu ni estas fieraj, nin enkondukas ĝis la interno de la aeroplanejo.

Mi gratulas lin laŭ mia speciala birda kompetenteco.

Malgraŭ la kontraŭa vento, ni alvenis de *Lyon* (115 km) dum unu horo.

Bela loĝejo, je mia parolo, tiu de nia Centra Oficejo! Aŭtomobile mi alvenas ĝis la pordego sur la bulvaroj. Nigrovitraj elegantaj tabuloj min gvidas ĝis la tria etaĝo. Tie mi falas en la akceptemajn gastamajn brakojn de S-roj *Jakob*, *Ĉe*, *Kreuz*. Laboremaj fraŭlinoj, simpatia juna oficisto prizorgas la UEA-aferojn. Ĉiuj parolas tiel bone, kiel deĉas en la koro de Esperantujo.

S-ro *Jakob* dromigas min en la aktujojn, statistikilojn kaj registrolibroj de UEA. Vere estus bonege ke ĉiuj UEA-anoj vizitu sian Centron, poste ili fierus je sia Asocio, vera hejmo de la ordo. Bedaŭrinde ke....

Sed mi ne kritikos. Mi diros nur ke dank' al supere laŭditaj Sinjoroj, danke speciale al Sinjoro Ĉe, mi pasigis ĉe la Lemano vesperon ja neforgeseblan. Mi falis de mil metroj da alteco sur la Centran Oficejon, kaj kiel mara birdo perdiĝinta en la mondo, mi trovis tie varman dolĉan neston....

Sed mi naskiĝis sin rokoj apud la maro, kaj al la maro revenis.

Julion 1926.

Mevo

Diffondete all'estero il fascicolo
24 PAGINE I T A L I O 51 illustrazioni ::
Prezzo L. 2.50 — 40 fascicoli L. 20 — Commissioni all'editore A. Paolet in S. Vito al Tagliamento

Per kvar linioj

SKIZITA ESPERANTISTARO

1. — D-ro D. PACE

Doktoro PACE venas — maltime tradukinta la Dian Verkon hejme — disĉiplo Hallesinta: la Majstran kuracarton — fidele li plenumas kaj eĉ pli vigle Muzo — lin logas kaj cerbumas.

2. — Kom-to A. PERI

Snb pli ol tridek haroj — post unu ronda lenso, mokema kaj bonema ja sen malica penso, alproksimiĝas PERI — la ŝip-elekt-aktoro la Komandanto nia — spritaj-« generadoro ».

3. — F-no C. ZAPPI

Italo CLEMENTINA — heplingve estas MILDA. Jam por kongresdangeroj - ne estus ŝi senŝilda. Ĝentila grupanino — eĉ ZAPPI « kudkonsilas »; nu, vere, per du lingvoj, sed saĝe ŝi babilas.

4. — F-no L. POLLINI

Ekplendas LYDIA prave — ĉar proverbar' ko-
[mencas
— malica legolibro! — kaj al virin' atencas.
Fraŭlino jen POLLINI — kelkfoje forfluginta, sed ĉiam Esperanton — fidele reveninta.

5. — ARABENO

Jam ne plu kongresisto, kongreskernero, beno por la gajec-amantoj, brilegas ARABENO. Ĉu kvar sutiĉus versoj? ne estas proporcie por elsamideano, konat' internacie.

Vortar' marŝanta, foje li perdas unu paĝon, sed perdas nek pacemon, nek gajon, nek... vo-
[jaĝon;

r ondvinga, ŝancelpaŝas velŝipokapitano, ruĝbrila, altabliĝas pursangoĝenovane.

Lin konas duonmondo, li ĉies amikema: japanoj kaj nordanoj lin ŝatas rakontema: dank' al li la parolo-muziko de Ĝenovo la tutan Globon ravas — per Esperanto-povo. La Stelo en la penso — Lanterno en la koro, lumturo de Ĝenovo... kaj sunsubir' el oro la maron koloranta... la bildon li karesas dum estas ie, tie: nu, fide! kaj sukcesas

la « Devojn de la Homo » - modele jen sugestit' « Al Esperanto veni — kun Esperanto resti ».

6. — D-ro STROMBOLI

Vulkanon vizitiri — jam estas ja danĝero sed ĝin priskribi! vere — timiĝus rinocero!

El la kvarversa baro — verŝiĝas kiel lafo la pleno de la Muzo — la vervo de la trafo. Vi konas certe kelkajn — vulkanojn de la lando lazuron makulantajn — per sia fumrubando; sed la Vulkanon *Strómboli* — pri kiu aŭdis vi ne estas tiu STRÓMBOLI celata nun de mi.

La malpligranda frato — honeste erupcias nur hejme; sed terure — se tiu-ĉi funkcias! Eŭropon de Krakovo — ĝis Antverpen' edziĝa se li aperas, kaptas — ekstremo teruriga.

Natur' pri li forgesis — la kruoprilongigon kompanse ĝi prizorgis — la lango-malligigon. Li mastras la blankvarman — metalon de for-
[nego,
li batas sur amboso — verdpintojn de Stelego.

Ve min, se malkonsente — diskutus mi kun li... ve same min, se milde mi dirus: jes, ja, si! Konsilo eksekvita — fariĝas malkonsilo, riproĉas eĉ la Majstron CERRORDORENVERSILO: kritikis erupcie — kritikis C.-K.-anojn nacifederacion — grupestrojn kaj grupanojn kritikis ISA-estrojn — kritikis ne-uzantojn kritikis verkemulojn — kaj lingvoparolantojn kritikis skeptikulojn — naivan mokas kredon kaj se kompat' atakas — Doktoron - eĉ - AL-
[FREDO'n!

Esperantujo fine — elkritikegadita dissaltas pulvorita, sternita, disbatita: ĉe flava GRAMATIKO — dum lasta trabo knaras fine D-ro STRÓMBOLI, la flavbarbulo, staras.

7. — N. U. D-ro Prof-ro TOSCHI

Nobela homo Toschi — la ĉefsekretario, verkema kaj flatama — la Lernejestro-ĉio, al Esperanto vivon — junecan mem oferas: sed falas en edziĝon — kaj tuje malaperas.

8. — Prof-ro E. SPAGNOL

Sub blankaj lipharegoj — mentonofadenaro, inter vang-montoj nazo — ĉerpiĵ' el ĉerizaro, en mano sunombrelo, kaj Esperant' en koro SPAGNOL jurist' alveuas — Ĝenova profesoro.

Mevo

NE FORGESU

ke ITALA E. REVUO bezonas
MIL ABONANTOJN.

ITALA KRONIKO

Roma. Ŝajnas ke la Roma Esperanta Grup-estraro intencas sperti la fidelecon de siaj anoj per promenadoj, kiuj okazas nepre en pluvaj tagoj! La antaŭan fojon multnombraj geobstinuloj ĉeestis; dimanĉon, la 11-an de julio, oni vidis nur la obstinulojn (rimarku la forlason de «ge»!), trankvile babilante sub la *Arco di Costantino* dum sur ĝi la pluvo senĉese falis. Sed kiam Zeŭso konvinkigis, ke li estas senpova kontraŭ ili, kaj ke estas neutile malŝpari la ĉielan akvon, jen la obstinularo gaje ekpromenis, mokante Zeŭson kaj liajn fulmojn per proponita starigo en la Grupo de aparta fako, kiun oni nomos: «La Esperantistaj Fiŝoj» aŭ «La pluvego estas nia!».

25-7-26. — Lasta somera promenado tra la *Villa Umberto I.* Bonega vetero; do: multnombra ĝeĉestantaro, senfina babilado (ho, la samideaninoj!), fotografajoj. Grava danĝero minacas la kronikiston: la grupaninoj vane ĉasadis lin por lin pumi pro la rimarko inter parentezoj, kiun ili legis en la lasta kronika noto. Feliĉe neniu sciis kiu li estis kaj li mem, tute nature, aprobis la inan indignon. Jen kio povas okazi kiam oni estas fidele rakontanto de l' vero....

Trieste. La 27-an junio nia grupo faris sian unuan ekskurson al Kastelo Moccò, al kiu partoprenis kleraj gesamideanoj kaj dum kiu oni faris belan fotografajon.


Ni havis la agrablan viziton de klera samideanino f-no Elli Ahlstrom el Stockholm, kiu parolis pri la E.-movado en Finnlando. Nian grupon vizitis ankaŭ f-noj Ciper kaj Willy el Zürich.

La estraro de la XII-aj Floraj Ludoj aljuĝis al teatra verko de nia Prezidanto D-ro Ĝhez *Fraŭlinoj, imitu min!* la premio de grupo «Barcelona Stelo».

La ĝentila samideanino f-no Lidia Levi flandiniĝis kun sam. s-ro Norberto Franz. Al novaj gefianĉoj niajn plej korajn bondezirojn de senfina feliĉeco.

Udine. Spite de la ne favora varmsezono, la vigla agado de la loka Grupo tamen senhalte daŭrigadas. La 22-an de julio okazis publika parolado de Lernejestro el Palmano-va S-ro Alfredo Lazzarini pri «Lingvo Friula» kaj la 28-an samonate D-ro Giulio Cesare el Udine majstre deklamis versaĵojn friulingvajnu de nuntempuloj.

Multnombra klera ĉeestantaro; brila sukceso! La vesperparoladoj daŭrigados, sub aŭspicioj de la ĉi-tica grupo, ĝis la malfermo de loka Popola Universitato. - Per longaj raportartikoloj la loka gazetaro altiris la atenton pri nia Grupo. Promesplena propagando estiĝas kaj fruktorieĉan rikolkampon ni preparas por la vintraj kursoj. Ĉiam antaŭe plej kurage!



P. MÉRIMÉE, Mateo Falcone kaj aliaj rakontoj. Berlin, Rudolf Mosse, Esperante-Fako, 1926 (Biblioteko Tutmonda No. 1), pp. 64. (Unu deknombra serio kostas 4 Mk.).

Jen la unua volumeto de la *Biblioteko Tutmonda*, ĵus iniciatita de la konata firmo R. Mosse en Berlin (la eldonanto de *Berliner Tageblatt*): eleganta 64-paĝa broŝuro, kiu enhavas kvar rakontojn de P. Mérimée (1803-1870), kun bildo kaj mallonga biografio de la aŭtoro. La eksterordinarajn kvalitojn de Mérimée kiel novelisto oni ja konas: en severe objektiva rakonto kaŝiĝas profunda korduŝo; ĉefe en *Mateo Falcone*, montranta korsikan patron, kiu mortpunas sian filon, ĉar li pertidis la gastecan leĝon.

La traduko de konata samideano s-ro J. Borel, estas tre zorga; ni rimarkis kelkajn akcepteblajn neologismojn, precipe militermojn (*avanci, ĉako, fugi, parapedo*); oni korektu (p. 42) vorton *baldaheno* anst. *baldekono*.

Tre interesa entute estas la programo de la tri jam anoncitaj serioj: literaturaj kaj popolsciencaj verkoj, tradukaĵoj kaj originalaĵoj. Verkoj de Italoj ne estas pramesataj, kredeble ĉar neniu Italo sin anoncis: bedaŭrinda, sed facile riparebla fakto. b. m.

L. JUN, *Ruĝo kaj Blanko*. Leipzig, Sennacieca Asocio Tutmonda, 1926, pp. 67. Prezo ne montrita.

Kolekto de kvar originalaj noveletoj kaj rakontoj originale verkita en Esperanto (Cimoj: Delegitaro; Nekrologo; Kiun kaj Roza) sufiĉe strangaj kaj diversaj de kutimaj verkaĵoj «laŭ burĝa gusto». Sed ĉu simplaj laboristaj travivaĵoj estas sufiĉe interesaj por fari, tute solaj, literaturon?

S. ZIEGLER, *Sekspsikologio*. Leipzig, Sennacieca Asocio Tutmonda, 1926, pp. 53. Prezo ne montrita.

Ĉar kurvoj kaj statistikoj videbligas la tipojn kaj servas al la ekkonado de elektitaj karakterizoj, tial la aŭtoro pritraktas en tiu ĉi esperanta originalaĵo la kurvojn de maturigantaj evolvoj de virsekuloj: li distingas zonojn de organevoluo, de erotevoluo kaj de impulsevoluo.

La katenoj de Maljusteco. Virina Krestomatiko de *Sennacieca Revuo*. Leipzig, Eldona Fako Kooperativa, 1926, pp. 40.

Mallongaj tradukaĵoj el 8 lingvoj de noveletoj kaj sciencaj problemoj rilatantaj infanojn kaj virinojn.

Tipografia Editrice A. Paulet, S. Vito al Tagliamento A. Paulet, dir.-reop.

501. Redolfi sig. Amedeo Via Mentana 2-11 SAMPIERDARENA	526. Associazione Impiegati Civili Corso Vitt. Emanuele LIVORNO
502. Spallarossa cav. Emilio Via A. Volta 20-11 GENOVA	527. Giarretta sig. Vasco Napoleone Casella Postale 83 VICENZA
503. Artuso sig. Romano Via Gemona 12 UDINE	528. Mainardi sig. Giovanni Viale Vittoria 1 MILANO
504. Liorre sig. Giuseppe Via Carlo Tenca N. 28 MILANO 29	529. Rizzato sig. Alfredo Via Eustachio 8 MILANO
505. Trenti sig. Corentino (Trento) PIETRA MURATA	530. Bologna cap. Enrico Via Balbi 9-5 GENOVA
506. Coppola sig. Alfonso (Parma) BORGIO S. DONNINO	531. Verdini sig. Fiorenzo Viale S. Bartolomeo 69 LA SPEZIA
507. Ferri sig. na Elda Via Calvi 5 VOGHERA	532. Magliulo sig. Nicola Via Duomo 202 NAPOLI
508. Lissa sig. Giuseppe Via Borroni 10 VOGHERA	533. Cappabianca sig. Francesco Via Vittoria Colonna 40 ROMA
509. Robutti sig. Luigi Borgio Plana VOGHERA	534. Pisa sig. Jaques — p. sig. a Coen Ida Via Cola di Rienzo 271 ROMA 31
510. Sacchi sig. Oreste Piazza 24 Maggio 2 MILANO	535. Monteflori sig. na Anna Via Giulia 188 ROMA
511. Agostini sig. a Adele Via Solferino 34 MILANO 11	536. Isopi sig. Mario Via Giovanni Marinelli 1 ROMA
512. Fontana sig. Rufino Via Milazzo 28 ROMA	537. Morinelli sig. Benedetto (Rovigo) ADRIA
513. Costantini sig. Ugo Via Cavour 108 ROMA	538. Toschi dott. Umberto Viale Gozzadini 7 BOLOGNA 4
514. Boccia sig. na Filomena, insegnante (Napoli) OTTAIANO	539. Tortorella sig. Ernesto Casa Penale (Napoli) S. STEFANO
515. Rossini sig. na Concetta, insegnante Casilli di S. Giuseppe Vesuviano	540. Becattini sig. Giacinto Via Bolognese 6 FIRENZE 25
516. Casino d'Unione « G. Sentieri » (Napoli) OTTAIANO	541. Nofri rag. Giuseppe Via Cimabue 42 FIRENZE
517. Bonetti sig. Giovanni, p. Rist. 'Pisetta' Piazza Dante TRENTO	542. Scarselli sig. Vasco Viale dei Mille 12 FIRENZE 28
518. Del Sal sig. Guido PORCIA DI PORDENONE	543. Viterbo avv. Carlo Alberto Via Jacopo Nardi 28 FIRENZE 22
519. Franciset prof. Annibale - Villa Beatrice (Perugia) CITTÀ DELLA PIEVE	544. Associazione Internazionale « Scudos » Piazza S. Maria in Campo 1 FIRENZE
520. Tancredi ing. prof. Angelo Raffaele R. Scuola Complementare SAVONA	545. Galli sig. Vittorio Via Tiepolo 4 TORINO 16
521. Perazzo dott. cav. Ernesto - Corso A. Saffi Comando Corpo Speciale Volontari Marinali - Batteria Stella GENOVA	546. De Nardo sig. Vittorio Via Scussa 7, IV TRIESTE 14
522. Camera di Commercio LIVORNO	547. Mora Ten. Colonn. sig. Manlio Scuola Applicazione Fanteria PARMA
523. Cecchelli sig. Osvaldo, Perito Industriale Piazza Garibaldi 11 LIVORNO	548. Fasce M. Ettore Via Cabella 22-12 GENOVA 3
524. Associazione Volontaria di Soccorso LIVORNO	549. Palmeggiani avv. comm. nob. Filippo Via Zamboni 9 BOLOGNA
525. Sig. Comandante Grana Corpo RR. Equipaggi SPEZIA	550. Bertani sig. Vittorio Via Balbi 42 ROMA

INTERNACIA MEDICINA REVUO

depost januaro 1925 estas eldonita sur
tute novaj bazoj.

Cefredaktoro: Profesoro Vanverts el Lille.

Kunlaborantaro el ĉiuj landoj.

En havo: originalaj artikoloj; aŭ-
torferatoj; referatoj; komunikajoj de la
Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio.
Diversajoj.

Abono: 1 Dollaro, aŭ samvaloro.

Pri sciigoj, sendo de dokumentoj, k.t.p.,
sin turni al Redakcio kaj Administracio:

D-ro Briquet, rue de la Bassée 31, Lille (Franclando)

La sola populare scienca ĵurnalo
Vere fundamenta lingvo
Multaj ilustraĵoj

Internacia Radio-Revuo

Organo de la
INTERNACIA RADIO-ASOCIO

Je nekredibla malalta prezo:

== 1/2 dolaro jare ==

Postulu tuj kontraŭ responkuponon

40-paĝan specimenon!

Eldonejo: E. Chiron, 40, rue de Seine, Paris VI.

RADIOFONIA

RIVISTA QUINDICINALE
DI RADIOELETTRICITA'

Ĝi estas la ĵurnalo, kiu inter la unuaj en Italio,
akceptante l'ideon de la disvastiĝo de
l'Esperanto en la komunikado de la
Radio, kun la publikado de la Corso
de Esperanto kaj de la Calendario Radio-
Esperantista, merita havi la mag-
jan disvastiĝon inter la samideanoj.

Abonamenti:

6 monatoj L. 22, 12 monatoj L. 40
(estero, 6 monatoj L. 25 - 12 m. L. 46)
Unu Numero L. 2

Redakcio kaj Administracio:

ROMA, Via del Tritone 61.

HEROLDO DE ESPERANTO

Neŭtrala organo
de la Esperanto-movado

Aperas grandformate, ilustrite

• ĈIU SEMAJNE •

Kunlaborantoj el 40 landoj

ARTIKOLOJ EL SFEROJ:

Esperantismo, Politiko, Socio, Scienco,
Tekniko, Radio, Sporto, Filatelio, Arto,
Literaturo, Muziko, Reklamo ktp.

Senpagajn specimenojn petu tute senĝene
de la Administracio

Heroldo de Esperanto

Horrem bei Köhln (Germanujo)

Antikva monumento de itala literaturo

LA FLORETOJ DE SANKTA FRANCISKO

JAM APERIS la esperanta traduko de tiu ĉi ora verko de la unuaj tempoj de la itala literaturo. Ĝustatempe ĝi aperas, ĉar la sepa jarcenta datreveno de la morto de la granda itala sanktulo, kiun la tutmondo honoras, rememorigas unu el la plej eminentaj homoj kiuj vivis sur terglobo.

LA FLORETOJ preparolas pri Sankta Francisko, pri multaj liaj kunfratoj kaj pri la rapida disvastiĝo de tiu religia Ordeno, kiu konkeris spirite la tutan mondon kaj al kiu multe ŝuldas la nuntempa civilizacio.

La originala stilo de la verko, stilo rakonta, naiva sed tre elokventa, transportas nin al tiu tempo, en kiu la priskriba forto estis pro sia simpleco pli trafa al la sentoj de la popolo.

La esperanta traduko, farita tre diligente de nia lerta samideano *F. Pizzi*, tute ne perdas la unuan stilon, tiel ke eĉ en Esperanto la verko sin prezentas en sia tute originala kaj simpatia formo.

La eksterlandaj samideanoj sendube salutos kun plezuro la aperon de tiu ĉi traduko, kiu donas al ili la eblon de la ĝojiga legado de unu el la plej legindaj verkoj de la antikva itala literaturo.

Samtempe la italaj esperantistoj devas ĝoji, ĉar per la esperanta traduko la verko, kiu apartenas al la unuaj gravaj monumentoj de ilia patruja literaturo, povas esti konata en la tutmondo.

La volumo estas presita sur bona papero per klaraj preslitteroj, kaj ĝi havas artan kovrilon laŭ stilo de la epoko en kiu vivis la sanktulo.

Unu ekzemplero (dika papero) kostas: L. 8. — Komuna eldono L. 6.

Mendu tuj al eldonanto A. PAOLET, S. VITO AL TAGLIAMENTO (Italio)

Okaze de la VII FRANCISKANA CENTJARA DATREVENO legu:

BIOGRAFIO DE S. FRANCISKO EL ASSISI (Carolfi) . . . L. 3.—
TRA LA FRANCISKANA URBO ASSISI (De Carolis) . . . » 2.—
LA PADOVA LILIO (Biografio de S. Antono el Padova) (Carolfi) 5.—

(Por sendelspezoj aldonu; itallande 10 kaj eksterlande 25 %.)